

AVANCO 3'90

oficiala organo de kuba esperanto-asocio



enhavo

Orlando Paola
Matenigo post la verda tajdo 3

leteroj al avanco

La legartoj skribas 4

75a universala kongreso de esperanto

Parolado de la Alta Protektanto 5

Kongresa Rezolucio 6

havano vokas

Nova konkurso 10

kultura panoramo

Orlando Paola
En la duan jarcenton movade kaj kulture 11

Junio

Alexis
Analizo 14

AVANCO KURSUSO 15



havano, la 30an de decembro 1990 • n-roj 3-4/90 • aperas kvarfoje jare (sed ĉijare nur trifoje!) • eldonas kuba esperanto-asocio, pl. 2018, 10200 havano, kubo. telefono 63-4092 • ĉefredaktoro orlando raola gonzález • redaktoroj alberto fernández-calienes, alexis otero • grafikumis d & p eldonejo josé marí • pliaj kunlaborantoj serĉataj • prezo de unu ekzemplero enlande 0.50 cup, eksterlande 2.00 nig aŭ 2 irk, pagendaĵi al nia konto ĉe usa keax-u • subskribitaj artikoloj esprimas la opiniojn de ties aŭtoroj • ĉiuj rajtoj rezervitaj • reproduktado permesata, bonvolu indiki la fonton kaj sendi du ekzemplerojn al la redakcio.

NI
vidas
ĝin
granda!



*Feliĉan
Novan
Jaron!*

estimataj,

post atendo multe pli longa ol vi ĉiuj meritas jen la nova numero de *Avanco* en viaj manoj. Malgraŭ la kovrila indiko ni klarigas al vi, ke tiu ĉi kajero enhavas du numerojn kune, tio estas 3 kaj 4/1990. Pro tio la venonta estos 1/1991, do atentu kolektantoj kaj bibliografiistoj! Kiel vi tuj konstatos kelkaj el la kutimaj rubrikoj ne aperas hodiaŭ, kio fariĝos ankaŭ tuj memkomprenebla afero, ĉar ni decidis publikigi anstataŭ dokumenton sufiĉe gravan el la enorma protokolaro kiu restas ĉe ni postkongrese. Ne eblas maltrafi la okazon ripeti, ke tiu ĉi revueto estas ja via. Por la osaj numeroj, kiuj povas iri al presejo iam ajn inter postmorgaŭ kaj venontjare, urĝas trovi pliajn kunlaborantojn. Ne hezitu superŝuti nin per la rezultoj de viaj cerbumadoj.

Profitdonan legadon!

Mateniĝo post la verda tajdo

Orlando Raola González

Post preskaŭ du jaroj de obseda laboro, ni, plenaj de esperoj kaj laceco, travivis du skue mirindajn semajnojn, kaj nu, pretervivis nian kongreson.

Taksi ĝin sukcesa tute pravas, kaj eĉ iom banalas. Memkontentigo estas pli noca ol utila. Krome, indas analizi perspektive la relativan valoron de la *verda tajdo*.

Tiujn, kiuj ŝatas pompon kaj paradon, la kongreso ravis kaj senigis je prudento por la bezonata postkritiko. Por multaj, kiuj finfine ekuzis Esperanton ekster la klasoĉambro, kaj ĝi ebligis aliron al homoj aliaj, kaj dum tempero dividi kun ili vivon alian, la festego estis vere pinta. Kaj tamen, kelkaj el ni rigardis ĉiam la kongreson kiel altebenajon sur alsupra deklivo. Al tiuj ĉi lastaj ĉiam hantis demando: Kaj kion poste?

Unua grava konstato: ni eltenas kaj pluckzistas. Tiu ĉi postkongresa numero de la oficiala organo de KEA klopodos tion pruvi preterdube. Per ĝi debutas kaj salutas via nova ĉefredaktoro, ĉar baldaŭa patrinigo fortrenas de la ĉiutaga batalo la iaman redaktorinon.

Ankaŭ nia asocio havas novan prezidanton. Juna, aktiva kaj pli ol sufiĉe sperta kamarado Julián Hernández Angulo transprenas stafete post la kongreso la centran gvidan rolon en niaj vicoj. Ni dankas kaj adiaŭas nian antaŭan prezidanton Jesús Castillo Jiménez, kaj samtempe bonvenigas la novan, kiu tutcerte sciis stiri la ŝipon preter ĉiaspecaj rifoj kaj uraganoj.

Sed ni eniru brulantajn demandojn kiuj prezidas nian estantecon. Por vivi, ĉiuj

socioj (inkluzive nian mikrokosman socion) bezonas planon, ambaŭ strategian kaj taktikan. Bonŝance, la plejsupera aranĝo de la tutmonda movado montris al ni ne nur niajn kapablojn, sed precipe niajn mankojn. Tial ke ni jam konas ĉi lastajn, estus vere malsaĝe ne fundamenti kontraŭ ilin niajn gvidliniojn por la laborperiodo ĵus komenciĝanta.

Ĉi pago ne povas anstataŭi la multajn bezonatajn kunsidojn kaj diskutrondojn, sed nepre ĝi intencos inviti vin al kuna kaj trankvila meditado pri esence gravaj aferoj kiuj certigos (aŭ kiuj flankenlasite povas malcertigi) la estontan Esperantovivon nialande.

Ni memoru momente la brilajn kongresajn sesiojn: prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato, kunvenoj de diversaj fakaj asocioj, seminario pri informado, debatoj pri la kongresa temo. En ili ĉiuj, malgraŭ la ĉeesto de preskaŭ 400 kubaj delegitoj ĉie tra la kongresejo, trege malofte oni povis aŭskulti kubajn voĉojn. Ĉu ni akceptu pasive la klarigon, ke kelkaj inter la kubanoj kiuj povintus partopreni tiajn aranĝojn estis tro ŝarĝitaj de organizaj kongresaj taskoj kaj do ne sukcesis aŭdigi siajn voĉojn? Jes, vere, sed tio estas nur preteksto, kaj ĝi ne malebligu al ni gravan konstaton: Se ni sukcesis kvante ankoraŭ ni estas tute postrestantaj kvalite.

Kaj tiu verego altrudu al ni plej sekvidan vojon al la estonteco: Plikerigo de la landa Esperantistaro, tiel ke ĝi povu inserti sin en la monda fluo de la Esperanto-kulturo, kie ĝis nun ĝi okulfrape

mankas. Kaj tiu ĉi laboro estas nepre duflanka: unue ĝi alcelu la engaĝigon de la nunaj Esperantistoj, kaj due sed ne malpli grave, Esperantistigon de homoj el plej diversaj sciosferoj, kiuj nepre riĉigos nian komunumon, eĉ konsiderante ĝin kiel eron de la internacia.

Konekse kun ĉi lasta postulo staras ĝisradika remodeligo de nia instrusistemo. Por ke ĝi finfine ofertu kiom da elektelecoj la potencialaj varbotoj ŝatus havi: perkorespondajn kursojn, kursojn direktitajn al difinita aĝ- kaj profesigrupoj, paroligajn rondojn, superajn kursojn, eksperimentadon uzante plej diversajn kaj novegajn metodojn ktp.

Alia nepretervidebla fakto, kiu nin frapis kaj zorgigis, estas la enorma diferenco inter la niveloj organizaj kaj kvalitaj inter la ĉefurbo kaj la cetero de la lando. Forigi tiun ĉi mankon estos ja komplika tasko, sed vide al la ĉirkaŭkongresaj okazaĵoj, pri ĝia farendeco neniu plurajtas dubi.

Nu, jen tri aleoj por transiri en nian duan jardekon. Ĉu vi dezirus proponi plia(j)n? La podio malfermas kaj bonvenigas vin por ke ni ĉiuj aŭskultu vian kontribuon. Jam la tuta Esperantanaro gravedas je laborpreteco.

En pluraj frontoj, jam okazas esperigaj avancoj. Malpigra komisiono prilaboras projekton por nova asocia statuto kiu organizu fundamentos la novan etapon. La plej signifa parto de la Esperanto-intruisitaro seminare privedidos multajn neprokrasteblajn problemojn.

Kiun rolon ludos nia modesta revuo *Avanco* en la antaŭonta moviĝo? Mi celas ke ĝi fariĝu forumo kaj ligilo. Kaj ke vi atendu ĉiam novan aperon kiel la bestaro atendas en Nordio la alvenon de printempo. Ni ne konas printempon tamen imagpovo certe ĉe ni ne mankas. Kompreneble miajn celojn mi nur atingos viahelpe. Kaj pri ĝi mi jam kalkulis kiam mi akceptis tiun ĉi novan respondecon.

leteroj al avanco

Tiun ĉi kolumnon ni rezervis dum enpaŝigo por aperi leterojn senditajn al la redakcio fare de la kuba kaj eksterlanda legantaro de *Avanco*. Kiel vi povas konstati, ĝi aspektas iom malplena ĉinumere. Ni tute certas, ke via kunlaboremo (kaj bonkoreco) ne permesos estonte similan situacion. Antaŭdankon.



75a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Malferma parolado de la Alta Protektanto, d-ro Carlos Rafael Rodríguez

La multaj formoj por klarigi la naskiĝon de la homaro, inter kiuj la Biblio kaj ties libro Genezo akiris plej universalan scicon, ĉiuj prezentis la homon kiel estaĵon kapablan komunikiĝi kun la ceteraj kaj ekdialogi kun ili.

Ŝajnas kvazaŭ la homo ekloĝis sur la tero dotita per lingvo, ebliganta lin interrilati kun la ceteraj, eĉ alparoli la diojn, de kiuj li dependis, kaj li disponis tiucele komunan lingvon.

Nenio povas stari plej for de la realo kaj de scienca konceptado pri la mondo. La atingo de lingvaĵo, la fakto ke la homoj, preterlasante praaĵn kaj krudajn formojn de interrilatado, iom post iom, lante kaj pene, atingadis konsenton inter si rilate nomadon de ĉiaspecaj aĵoj kiuj ĉirkaŭis ilin, estis unu el la plej gravaj taskoj elstarigintaj la homon inter la milionoj da vivestaĵoj kiuj loĝis nian planedon, kio lokis lin kape de la cetera bestaro kaj tiel li ekkonkeris, pere de penso kaj ago, la mondon kie li loĝis.

Identigo de la ĉirkaŭaĵo kaj ties ekinterpreto estis la komenco de la homa historio. Nomi ĉion per vortoj, sukcesi, ke ĉiuj identigu ĉion sammaniere, estis unu

el la decidaj vojoj kiuj ebligis al ni nuntempe malkovri la misterojn de atomoj, eniri la diversajn labirintojn de nervĉeloj kaj konkeri la Kosmon.

La lingvo fariĝis poiome instrumento por esprimi la homan intelektan kapablon. Sen la kapablo interkomunikiĝi, la homoj neniam estus lasintaj praaĵn organizformojn, ekzemple la hordojn, kiuj kontraŭstaris unu la alian, kaj disputis pri ĉasado aŭ pri la estiĝanta agrikulturo atingita per tiuj necertaj ekbriloj de inteligenteco kiuj ekaperis inter ili.

La lingvo fariĝis esenca kaj plejkara ilo por la homa progreso. Ne eblas trovi pli pasiigan sciencan esploron nek pli interesan rakonton ol tiuj kiuj pritraktas tiujn epizodojn dum la estiĝo de homa interkomunikado. Laŭlegende, kiam la homoj volis konkeri la ĉielon, ĉiopova Dio malobligis plialtigon de la Babela turo per konfuzigo de lingvoj inter la konstruantoj. Miloj da homaj grupoj komencis tiun misteran ekkonan taskon, kiu kondukis al ĉiam pli grandigantaj grupoj ĝis post jarcentoj aperis la modernaj ŝtatoj. El kondensigo de lingvoj komunradikaj surbaze de geografia proksimeco aŭ en interŝan-

ĝoj dum translokiĝoj, estiĝis iuj lingvoj kiuj elstaris kompare kun la ceteraj.

Dum la unuaj historiaj etapoj, precipe sur la terparto poste konata kiel Eŭropo, malgrandaj sociaj grupoj ligis sian militan genion al arta intelekta kapablo, kaj tiel estiĝis civilizojn kiuj pretervivis tra la tempo edife kaj instige. Tiaj estas la Grekio de Sokrato, Platono, Aristotelo, Homero kaj Periklo. Tiaj estis la civilizoj indianaj kaj tiuj de kelkaj afrikaj regionoj. Tamen la tiama historio, kolektita en eposoj, same en Mediteranea regiono kiel en tiu mistera kaj fora Kataĵo de Marko Polo aŭ en la ankoraŭ ne konataj teritorioj poste trovotaj de Kristoforo Kolumbo, estis ne nur fonto de grandaj historiaj verkoj, sed ankaŭ de pasiaj kaj longdaŭraj bataloj. El ili fontis la sklavigo de malgrandaj grupoj kaj poste la grandaj imperioj, kiel atestas por la postularo Romio de la Cezaroj, Makedonio de Aleksandro aŭ Persio de Kserkso.

Kiam la lingvo fariĝis, krom komunikilo, regilo kaj posedilo, komenciĝis longa vojo de altrudoj, kiam armiloj kaj mono ĉiam kunportis privilegian lingvon, kiu evoluis de la imperiaj romiaj tagoj ĝis la plej lastaj etapoj de la nuntempa angla lingvo.

Ekestas tiel nova batalo, por konservi la originan lingvon, por rezisti kontraŭ la nova lingvo alvenanta en ordonoj kaj komercaj transakcioj. Dume tutaj lingvoj malaperis, forglutitaj de la reganta lingvo aŭ kondamnitaj al uzo de malgrandaj grupoj kiuj klopodis, en Meksiko, Peruo aŭ Ekvadoro, konservi siajn originajn kutimojn kaj la gepatran lingvon, kiujn oni intencis forpeli. Tiam disvastiĝis, kiel streĉa kaj senpia koloniigo, akompanate ne nur de kulturo, sed ankaŭ de morto kaj ekstermo, la lingvoj, kiuj reprezentis la tiutempan regpovon, kiu intencis transformiĝi, kaj keikfoje sukcesis tion fari, en porĉiaman kulturalan regadon.

El tiuj kontraŭdiroj inter la popoloj, meze de kiuj imperioj kaj regnoj inter-

KONGRESA REZOLUCIO

La 75a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Havano (Kubo) de la 14-a ĝis la 21-a de julio 1990 kun 1 617 partoprenantoj el 54 landoj, kaj traktinte la temon «Esperanto, evoluo, kultura diverseco», konstatas,

ke la kultura diverseco estas grava parto de la homa heredaĵo kaj ke la morto de lingvoj kaj kulturoj estas signifa perdo por la homaro;

ke, same kiel pri la kvalito de la biosfero, ni respondecas pri la heredigo de tiu kultura diverseco al postaj generacioj;

ke la lingvoj kaj kulturoj konstante evoluas: minoritatoj aperas kaj malaperas dum la monda socia kaj ekonomia situacio ŝanĝiĝas;

ke, aliflanke, simpla ignoro de la rajtoj de minoritatoj kaj koncentrado je plibonigo de materiaj vivkondiĉoj endanĝerigas la liberecon de unuopaj popoloj evolui laŭ propra maniero; ke sekve necesas krei strukturojn por efike administri diversecon en mondo kie la moderna vivo emas kondiĉi al ĉiam pli da unueco;

bonvenigas la iniciaton de Unesko lanĉi la Jardekon de Kultura Evoluigo, kaj

notas, ke la kongresa temo estas rekte ligita al tiu jardeko;

atentigas pri la valoro de Esperanto kiel ponto inter la lingvoj kaj kulturoj kaj rimedo por intersanĝoj;

alvokas Uneskon, ke ĝi pli aktive utiligu Esperanton kiel rimedon de kultura intersanĝo; kaj

rekomendas al la diversaj Esperanto-organizaĵoj, ke ili partoprenu en la Jardeko kaj konsekvence atentu en la agado la ligojn inter la internacia lingvo kaj kultura diverseco.

rilatiĝis pere de geedziĝaj ligoj, kaj la regitoj ribelis kontraŭ tiranecon preskaŭ neelteneblan, estiĝis, en la moderna epoko, la naciaj ŝtatoj, kiuj pludaŭras en Eŭropo, Azio kaj Ameriko, kaj al kiuj pli malfrue aliĝos tiuj ŝtatoj naskiĝintaj el la disfalo de koloniismo en Afriko, kie landoj kiel Etiopio kaj Egipto antaŭsciigis la memstaran vojon.

La moderna ŝtato ekestis akompanate de ties propra lingvo, estiĝinta foje, kiel en Latinameriko aŭ en Azio, el koloniiga rego, kiu aldonis siajn karakterizaĵojn, lingvistikajn trajtojn, iom malsimilajn. La nuntempa mondo fariĝis tiel amaso da similaj kaj kontraŭaj lingvoj. La sama lingvo reprezentis foje tradiciojn, ne nur malsimilajn, sed eĉ batalantaj kaj reciproke kontraŭaj. La milito, kiun ĝis nun neniu povis forigi, kaj la komerco, je kiu validas same ĉiuj popoloj kaj sistemoj, samtempe kuniĝis kaj disiĝis. La universala komunumo sin esprimis per la fakto, ke ekzistis en ĉiuj partoj de la mondo, vortoj kiuj taŭgis por esprimi la saman koncepton kaj por nomi la saman objekton. Tamen, por reciproka interkompreniĝo la homoj devis helpi al si per lernado de la fremda lingvo, kiu en diversaj historiaj periodoj ĉiam havis regantajn sektorojn, kiel esprimon de milita povo kaj de riĉeco.

La diverseco de nacioj, la kontraŭstaro de interesoj, la militaj aliancoj kiuj estiĝis poste, precipe en Eŭropo, kaj plimultiĝis ekde la Franca Revolucio, devigis la homojn okupiĝantajn pri filozofiaj analizoj rilate la destinion de la homa socio, sin

demandi ĉu la mondo alcelis ĉiaman digon aŭ interkompreniĝon, ĉu longe daŭros la naciaj ŝtatoj, kun geografiaj limoj, kultura diverseco kaj lingvaj distingiloj, ĉu estiĝos mondo de militaj aliancoj kaj politikaj konceptadoj postulantaj eliminon de kontraŭuloj kaj altrudiĝon aŭ ĉu ni survojas al mondo asimptote konverĝa kie paco estos ebla kaj diferencoj subiĝos ĝis tiu ideala momento kiam la homoj sin konsideros fratoj kaj ekzistos en la mondo kultura identeco, pliriĉigita de ĉiuj tendencoj, ĝis ekestos la ebleco de komuna lingvo.

Tiel estiĝis konflikto inter la *real Politik* kaj idealeco, kelkfoje turniĝanta en idealismo.

Skeptikuloj ne akceptas alian eblecon ol tiu de kontraŭstaro de unuj popoloj kontraŭ la aliaj, de la milito aŭ almenaŭ la permanenta kontraŭeco. Aliaj konsciigis pri tio, ke la mondo marŝas pli malpli malrapide, depende de la propra ideologia tendenco, al interkompreniĝo. Ni socialistoj, inter ili, konsideras ĉiun fine de longa batalo kaj

klasa opozicio oni atingos universalan unuecon, en mondo kie ekspluatado, mizero kaj malegaleco jam malaperis porĉiam. Unue Grocio kaj pli poste Kant pripensadis la ideojn el kiuj naskiĝis la Ligo de Nacioj kaj Unuiĝintaj Nacioj.

Tamen, la prilingva debato pludaŭris. Kelkaj revis pri mondo kun unu sola lingvo kaj tio ŝajnis al aliaj, malgraŭ ties aspiro al universala paco, io malpliriĉiga. Laŭlonge de tiu ĉi longdaŭra ideo konfrontado, ekestis homoj por kiuj interkompreniĝo inter la popoloj, komuniĝo super lingvaj diferencoj fariĝis iaspeca



universala amikeco kaj homa interkonsento. Ludoviko Lararo Zamenhof apartenis al tiu granda aro de elstaraj viroj kaj virinoj. La ideo ke homoj povus vivi pace se ili interkomprenigus pere de komuna lingvo aperis en lia junago kaj neniam plu forlasis lin. Nia kunsido estas la plej bona omago al tiu klopodo.

Neniu heroaĵo estis pli granda ol tiu, kiun Zamenhof metis antaŭ si. Ellabori novan lingvon, kapablan allogi la atenton kaj inda je respekto fare de viroj kaj virinoj el ĉiuj mondpartoj, ŝajnis nerealigebla afero. Kiam cent jarojn poste ni renkontigas ĉi tie, sur malgranda insulo pri kiu oni malmulte sciis kiam Zamenhof ekkomencis sian paciantan laboron, kaj ni vidas nin inter pli ol 1200 gedelegitoj venantaj el la plej foraj partoj de la mondo, arigantaj laŭ la plej diversaj profesioj, reprezentantoj de ideoj plejofte nesimilaj, ni ĉeestas la realigon de revo, kiu ŝajnis nebla. Du detruigaj mondmilitoj disigis la popolojn de tiu tempo kiam, rimarkinda koincido, la dudeksesan de julio, glora datreveno por la kubanoj, antaŭ cent tri jaroj, eliris la presejon la unua libro en tiu ĉi lingvo, kiun oni povas konsideri kiel produkton de historio, sed kiu estas, unuavice, rezulto de volforto, de homa energio.

Esperantistoj, dekomence nur manpleno, nun estas dekoj da miloj. Mi scias, ke vi surpriziĝos kiam mi konfesos, ke estante infano, dum la tagoj post la Unua Mondmilito, iam en la dudekaj jaroj, mi vidis la alvenon en mian hejmon, de leteroj skribitaj en stranga lingvaĵo, kiuj venis el Aŭstrio, el Francio, el Italio, senditaj al mia onklino ĵiam okupiganta pri Esperanto. Ni kiuj kredas je la homa unueco, nepre devas admiri la senegalan persistemon de tiuj kiuj sukcesis starigi pontojn interpopolajn en la plej malfacilaj cirkonstancoj.

La nacio pludaŭras kaj ankoraŭ pludaŭros kiel ento geopolitika. Bedaŭrinde naciismo, kiu ne nepre devas akompani la

nacion, sed estas ofte ties koruptiĝo, ankoraŭ pludaŭras. Naciismo estas taŭga kaj defendinda kiam ĝi efikas por konfirmi la nacion, sed ĝi estas ĉiam la nacio fariĝas preteksto por ataki aliajn popolojn, malpliigi ties rajtojn, minaci ties identecon. Kaj ni vidas kiel ĝi ankoraŭ manifestiĝas, kun pligrandiĝanta kaj malĝojiga vigleco, en mondregionoj kie saĝe plivalorus la unueco obligata de socialismo kaj la amikeco interhoma kiun tiu politika ideo antaŭsupozas kiel esencan elementon.

La latinamerikaj nacioj, dum tiu ĉi konvulsia historia etapo, ade plifirmigas sian individuan identecon, sed ankaŭ sian komunan karakteron. Afriko kaj Azio serĉas la vojojn por siaj malfacilaj integriĝoj. Komunuma Eŭropo estigas ekonomiajn ligojn kaj pliproksimiĝas politike, sen perdo de propra fizionomio fare de la nacioj. Ĉio indikas, ke dum historie longa tempo, la mondo unuigos ĉiam pli kaj pli, tamen konserviĝos la distingaj trajtoj kiuj formiĝis en ĉiu lando tra la jaroj.

Tio komprenigas do, la fieron de la kuba popolo, ĉar oni elektis la landon kiel sidejon de la 75a Universala Kongreso de Esperanto. Tiel, Havano viciĝas inter la gravaj urboj, kiuj dum la lastaj jaroj — Stockholmo, Brazilja, Vankuvero, Antverpeno, Roterdamo, Pekino —, gastigis la laboron de la esperantistoj. Tio supozigas, ke nia lando plenumas postulojn, kies malplenumo nuligus la sencon de tiu ĉi kongreso. La esperantistoj amas pacon kaj proklamas reciprokajn kompreniĝon inter la popoloj, kaj ili elektis Kubon ĉar ili konscias, ke interhoma solidareco, amikeco inter la landoj kaj universala paco ĉiam troviĝis inter la permanentaj aspiroj de nia tero. La esperantistoj sciias, ke alvenante en Kubon, ili trovas tian etoson de trankvileco kaj sereneco, kian postulas la spirito de pripensado kaj kulturo evidentigata de ilia kongreso. La esperantistoj scias, ke sur la stratoj de Kubo, en la sciencaj esplorcentroj, en la univer-

sitatoj, regas libereco, surbaze de justeco kaj progreso. La georganizantoj de tiu ĉi escepta knaveno komprenas, ke ĉi tie oni admiras ilian verkon, kaj respektas iliajn ideojn.

Avenis esperantistoj el la tuta mondo al lando, kie en la legendplena Santiago de Cuba oni fondis unuafoje kuban Esperanto-asociion en 1908, al lando kie elstaruloj de la kuba kulturo, kiel Fernando Ortiz troviĝas inter la instigantoj de Esperanto, kaj kie la Revolucio ebligis la ekziston de 26 Esperanto-lernejoj, kie jam studis pli ol 3000 interesigantoj pri tiu lingvo, kiu intencas unuigi la homaron.

La 75a Universala Kongreso pritraktos du temojn kiujn la kuba popolo apogas kaj defendas kiel parton de sia propra ekzisto: evoluo kaj kultura diverseco. Kubo batalas cele al evoluo ekde la unuaj tagoj de sia Revolucio. Nun, pli ol iam antaŭe, kiam la Tria Mondo travivas la plej intensan krizon meze de sia longdaŭra dramo, evoluo, ne nur de nia lando, sed ankaŭ de dekoj da landoj el Latinameriko, Afriko kaj Azio, fariĝas plej grava zorgo por ĉiu kubano. Diskuti pri evoluo estas pridis-kuti niajn proprajn ĉiutagajn problemojn, kaj ekvidi la tremigajn kaj angorigajn situaciojn meze de kiu vivas miloj da milionoj da homoj en mondo, kiu samtempe devas marŝi al paco kaj progreso.

Kaj ni deziras plenumi tiun celon meze de kultura diverseco, kiu ebligu al ni ĝin pliriĉigi per nia muziko de ĉiuj epokoj, per nia riĉa historia penso kaj pere de scienco, plikreskanta dum la Revolucio. Pro tio ni faras la programon de la kongreso, kune kun tiuj de la Internacia Junulara Kongreso kaj de la konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Dankon, amikoj esperantistoj, ĉar vi ebligis al ni helpi ankoraŭfoje la universalajn interesojn pere de tiu ĉi bela kongreso. Dankon, ĉar vi konfidis al Kubo de Fidel Castro, ke ĝi ofertas taŭgan etoson por gastigi tiom altan ideon de instigo

al amikeco, interkompreniĝo kaj komunikigo inter homoj kaj popoloj. Ĉie vi trovos fratecan ridon, popolan gajecon kaj varman amikan akcepton. Tamen vi devas konscii, ke malantaŭ ili troviĝas la zorgoj de minacata kaj atakata popolo, por kiu komunikigo nun fariĝis maniero ĝin ataki kaj renversi, tamen popolo certa pri la vojo entreprenita kaj pri la amikeco montrita de la ceteraj popoloj de la mondo. Tiel fidante kaj certaj ni sciigas al vi nian konfidon, ke la 75a Kongreso de Esperanto estos, en nia malgranda lando, ŝanco, ne nur por ke vi vin dediĉu fervore al la intelekta tasko kiu venigis vin ĉi tien, sed ankaŭ por ke vi ekonu kiel ni vivas, kiel ni laboras, en nia kuna strebo, por socia sistemo kiun nerezigneble elektis nia popolo, kiu preferus pereci antaŭ ol perdi sian historian identecon kaj homan unuecon. Jen Kubo, kiu vin akceptas kaj salutas.

Dankon.

(elhispanigis Orlando Roola González)

HAVANO VOKAS...



dimanĉe
horaro
valida
de
1990.09.07
ĝis
1991.03.07

Vojaĝu al Kubo senpage!

La Esperanto-redakcio de Radio Havano Kubo alvokas ĉiujn eksterlandajn legantojn de *Avanco* partopreni novan konkurson:

La unuan de majo 1991 Radio Havano Kubo fariĝas tridekjara, kaj pro tio, ĉiuj geaŭskultantoj kaj geamikoj tutmonde estas petataj respondi la jenan demandon:

Kio estas la fundamenta kontribuo de Radio Havano Kubo al la popoloj de la mondo dum sia tridekjara ekzisto?

La aŭtoroj de la kvin plej bonaj respondoj veturos nialanden tute senpage.

Ek al la respondo kaj fariĝu unu el la gajnontoj. Limdato por ricevo de viaj korespondaĵoj estas la venontan 30an de aprilo. Respondoj povas esti en Esperanto, aŭ en alia el la ceteraj ok lingvoj de Radio Havano Kubo, nome: hispane, angle, france, portugale, arabe, kreole, keĉue aŭ gvaranie. Krom kvin vojaĝoj, ankaŭ diversajn donacojn ricevos la aŭtoroj de la ceteraj dudek plej bonaj konkursoj. Sendu tuj vian respondon al poŝt-fako 6240, Havano, Kubo.

f UTC	n (kHz)	f (m)	REGIONO
0600-0820	11835	25.35	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
1700-1730	15340	19.56	Norda, Meza kaj Suda Ameriko
	11970	25.06	
	11850	25.32	
	11820	25.38	
	11760	25.51	
1830-1900	15435	19.44	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	15220	19.71	
	11950	25.10	
2200-2220	15220	19.71	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	11950	25.10	
2230-2300	11970	25.06	Norda, Meza kaj Suda Ameriko
	11950	25.10	
	11910	25.19	
	9535	31.46	

Atenton!

La baldaŭa ĉiutagigo de niaj radioelsendoj dependas de via reeĥo. Ni atendas esperige viajn leterojn!
Ĝis reaŭdo!

Orlando Raola González

Saluton, geamikoj! Nia postkongresa numero denove havigas al vi KP sur la paĝoj de **Avanco**. Neniam laciĝo fortranos min de konstanta alvokripetado: Trovu manieron sciiĝi al la redaktoro vian opinionon pri KP kaj eventuale viajn reagojn pri la jam publikigitaj tekstoj. Verdire, ankoraŭ mi ne scias kion vi preferas legi ĉirubrike, kaj konsekvence mi metas en ĝi ĉiajn materialojn laŭ mia bonrovo. Kompreneble do, mi pretas aŭskulti atente ĉies plendojn.

EN LA DUAN JARCENTON MOVADO KAJ KULTURE

Science parolante, datrevenoj estas tute sensignifaj. Kompreneble, la cikloj de diversaj homaj agadoj ne necese kongruas kun entjera kvanto da terroandroj. Kaj tamen, la homoj mem emas alsolenado de ĉiuj datrevenoj, nur tiel tiuj pligraviĝas. En 1987 ni ĉiuj festis la centjarigon de la lingvo. Oni dediĉis tutan jaron kaj eĉ pli (ĉu eble troe?) al elstarigo de tiu magia tricifero konekse kun la verko de Zamenhof kaj ties miriga posteularo.

Se vi tion petas, foje ni povus kunanalizi la kulturalan signifon de la jubilea jaro. Hodiaŭ ni prefere restu ĉe gravega renkontiĝo, kiu iom brile fermis la festoserion. Temas pri konferenco *Esperanto en la dua jarcento*, kiun organizis Hungara Esperanto-Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro, sub aŭspicio de TEJO, en la hungara urbo Szeged, 1988.07.13/16. En tiu kadro estis prezentitaj enhaviĉaj prelegoj fare de movadaj gvidantoj kaj teoriuloj, kaj oni ĝisate diskutis la strategiajn demandojn plej gravajn por la Esperanto-komunumo.

Post la prelegoj, intervenoj kaj diskutoj, la partoprenantoj kunmetis konkludan diskutmaterialon, celante pluan debaton sine de Esperantio.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri la detaloj, bv. kontakti la redaktoron. Mi ricevis donace de Oszkar Princz, sekretario de HEA, la

malneton de la prezentitaj prelegoj, inter kiuj plej elstaras:

Problemoj de la Esperanta teatro Ljubomir Trifunčevski; *Ĉu la Esperanto-movado povas ignori naturprotektadon* Reszo Baross; *Strategio de Bona Volo* Mario Luis Bosso; *Esperanto – inter societo(j) kaj komunumo: kia organiza strategio por la dua jarcento?* Giorgio Sillfer; *La Esperanto-movado kaj la Esperanto-komunumo kaj iliaj misfunkcioj. Eliro el la sakstrato* Géza Felső; *Esperanto – varo aŭ valoro? Kia summerkatiĝa strategio por la dua jarcento?* Marko Picasso; *Motivoj de Esperantistigo* Oszkár Princz; *Esperanto kaj la novtipaj sociaj movadoj* Sándor Kévész.

Kaj por pli sproni vian scivolemon, jen la «Tezoj de Princz», nuna estrarano de UEA pri landaj kaj fakaj asocioj. Per ili li helpas al ni pripensi kaj respondi al la demando: ĉu la anaro de la movado kreskas, stagnas aŭ malprogresas?

- unua hipotezo: Esperanto ne havas altirforton esperantigi la homojn.
- dua hipotezo: La Esperanto-movado ne havas forton konservi la esperantistojn en la movado.
- tria hipotezo: La Esperanto-movado parton de la iamaj anoj ne kapablas teni en la movado, eĉ parto de ili

malesperantistigas.

- kvara hipotezo: Esperanto kontentigas nur ne vivgravajn bezonojn.

Ĉu vi ion povas aldoni pri ĉio ĉi? Ni atendas viajn kontribuojn!

FRAGMENTO EL «LA ESPERANTO-LITERATURO: FENOMENO UNIKA» DE GIORGIO SILFER

(festoparolado
okaze de la SAT-kongreso
1987.08.23)

Kiel povis formiĝi literaturo, poezio, en la transnacia lingvo *esperanto*?

La demandon ni eĉ ne starigus, se ni atentus pri la etimologia signifo de la vorto «poezio» kaj pri ĝia parenceco al «artefarita» en la senco de «farita arte». Cetere, kiom da «artefaritaj» lingvoj naskiĝis por pure literatura celo? Ni pensu pri la makaronia latino de Teofilo Folengo aŭ pri la elfolingvoj, kiuj inspiris kaj motivis grandan parton de la produktado de John R. R. Tolkien.

Ĉi tiu ligo inter artefariteco kaj artismo ĉeestis ekde la komenco en la verkaro de Lazaro Ludoviko Zamenhof: la unuaj aplikoj de Esperanto estis en poezia kampo, ĉar Zamenhof testadis per poemtradukoj la valoron de la solvoj adoptitaj por sia lingvo. El la unuaj provoj, datitaj inter 1879 kaj 1881, restas nur kelkaj fragmentoj: ili ĉiuj estas versoj, originalaj kaj tradukitaj, precipe el Heine. Kaj poemo konkludis la unuan broŝuron, aperintan en 1887 en Varsovio, kun enkonduko, gramatiko kaj vortareto de la *Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto*; Zamenhof ja estis doktoro pri medicino, kio konfirmas la tradicion de geniulo ne engaĝita profesie en la kampo kie manifestiĝas lia kapablo: ni pensu pri la inventinto de la



Julio Bagby (1891-1967) Kálmán Kalocsay (1891-1976)

telegrafo, Morse, kiu estis pentristo...

Kiel la unua poeto estas kreanto de la lingvo, laŭ la modelo de Danto, tiel la kreinto de lingvo devas esti ĝia unua poeto. Ĉe Zamenhof ne ekzistis konflikto inter la socia celo kaj la artaj eblecoj de la inventaĵo. Sed la unua punkto (faciligi la komunikadon inter la gentoj, ĉar ĉion kompreni estas ĉion pardoni) estis-tuj akceptita de ĉiuj, dum la duan trafis la malkonsento de multaj, tiel ke originala literaturo disvolviĝis efektive nur post la unua mondmilito.

Multaj E-pioniroj kaptis la teknologian aspekton, akceptis la homamajn celojn, promociis la uzon kiel lingvo de komerco, turismo, scienco; sed la ideo pri literaturo esperanta estis tolerata nur funkcie al propagando, por impresi la neesperantistojn per imponaj tradukoj el la ĉelverkoj de la *Weltliteratur*, eventuale eldonitaj en luksa vesto.

En ĉi tiu unua fazo la tradukismo regas preskaŭ senkonteste: la Biblio kaj la klasikuloj (Shakespeare, Goethe, Tolstoj ktp) konsistigas tri kvaronojn de la literatura produktado en Esperanto, kiu havis sian centron (ĝis 1914) en Hachette kaj K-io de Parizo. Sed la tradukoj ne egalvaloras: Antoni Grabowski, Kazimierz Bein (Kabe), Zamenhof mem realigas la verkojn stile plej rimarkindajn. Ili tri estas poloj, kaj du polaj libroj fariĝas plej karaj por la Esperanta publiko: en poezio, *Sinjoro Tadeo* de Adam Mick-

iewicz, tradukita de Grabowski; en prozo, *La faraono* de Boleslaw Prus, tradukita de Bein. Tiuj libroj influas la tutan postan produktadon originalan, kaj la pensmanieron de la esperantlingva komu numo.

Ne havus sencon paroli pri kulturo originale Esperanta, se ni ignorus la kontribuon de la varsovia medio, de urbo kiu atestis la frustracion de du popoloj. Unuflanke la pola, kun glora pasinteco trem-pita en mallibera nuntempo; aliflanke la juda, kun la pezo de plurjarcenta diskriminacio kaj la konscio pri intelekta supereco: al ĉi tiu apartenis ankaŭ Zamenhof.

Tiel, kvankam «lingvo internacia» povas teorie signifi «lingvon interkulturan», la kulturoj hebrea kaj pola fatale liveris al nia literaturo kelkajn matricojn, speciale iun estetikan guston eman al certaj solvoj metrikaj kaj esprimaj, foran de la novaĵoj de la *Novecento*, kiuj tamen estis samtempaj al la tradukoj de Grabowski kaj Kabe.

Tuj post la unua mondmilito, kiu estingis la voĉojn de la pola skolo, Esperanto havis en Budapeŝto novan kulturan ĉefurbon. La poetoj de la nova generacio, kontraste kun la antaŭaj, preferis la originalan produktadon al la traduka. Sed la paradokso volas ke ĝuste en Hungario, de post Ferenc Kazinczy (1759-1831), neniu poeta kariero povas eviti longan trejniĝon en tradukarto el fremdaj lingvoj. Tiel, ĝuste la homoj al kiuj ni ŝuldas la unuan disfloradon de la originala E-literaturo, tiuj donis samtempe fortan impulson al ĝenro malfote aprezata en okcidento: la traduka poezio.

Ne plu temis pri peze propaganda motivado, nek pri la deziro konigi la verkojn el periferiaj kulturareoj: la hungara modelo sugestis la literaturan tradukon kiel rimedon por riĝigo, filologia kaj stila, de la idiomo en kiun oni tradukas.

La plej preparita kaj konscia rondo de E-poetoj kolektiĝis ĉirkaŭ Kálmán Kalocsay (1891-1976), kiu inspiris sian aktivecon precipe al Mihály Babits (1833-

1941). La listo de la verkoj hungarigitaj de Babits grandparte koincidas kun tiu de la esperantigoj de Kalocsay, kiu kompreneble aldonis diversajn titolojn hungarajn; la revuo direktata de Babits, *Nyugat* (Okcidento), polemike kontraŭ la madjaraj tradiciistoj, inspiris nian ĉefan beletran revuon intermilitan: *Literatura Mondo*, gvidatan de Kalocsay, sed precipe la babica ĉefverko, la traduko de la *Dia Komedio*, influis Kalocsay.

Babits estus povinta traduki Danton kiel faris erudikiulo Littré, kiu en 1880 kompletigis version de *Infero* en mezepoka franca lingvo. Bonsance li komprenis ke temas pri tute alia afero: necesas redoni ne tiom la enhavon kion la «stil novo» — esti kreema kiel Danto, agi sur la hungara kiel Danto agis sur la itala. La traduko de Babits estas ĝis nun grava etapo por la literatura hungara lingvo; Kalocsay spure al sia majstro, sukcesis doni al Esperanto, per sia *Infero* (1933), la dignecon de literatura lingvo.

La hungara eŝo, en la esperantlingva kulturo, estis eĉ pli vasta. Multaj referencoj de la madjara poezia mikrokosmo influis la Esperantan pensmanieron: per Gyula Baghy (1891-1967) firmiĝis la idealo de la vagabondo, kiel Petöfi, tamen dekantanta la ironion de la pusto en la homaranismon de kosmopolito, kies patrujo estu la mondo, kies lingvo — Esperanto; per Sándor Szathmári (1897-1974) elmergiĝis la pesimismo de iu Karinthy, komuna la granda parto de la hungara kulturo, kaj kvintesenco de la ĉefverko de Imre Madách: la tragedio de la homio kuŝas en lia neperfektleblo, Adamo ne povis ne peki, lia kulpo naskiĝis kun li.

Analizante la 46an IJK...

Alexis Otero

Ĉiam pli kaj pli da tempo disigas nin disde la kongresaj tagoj. Unue ĉe la Havana Kongresa Palaco kaj sekve ĉe Playa Girón. Tutmonda junularo svarmis kadre de la 75a UK kaj poste translokiĝis en la historia turismejon. Malgraŭ tio ke plurfoje mi atentigis rilate al kelkaj aferoj — surpaĝe de ĉi tiu gazeto mem —, neglektoj ekestis. Kiuj legis la antaŭe aperintan komenton, certe pravigos min. Nu, ni jomete analizu la kongreson en Playa Girón. Onidire neglektojn ne spektis (sed suferis) la arĝinta kongresanaro kaj jen unua demando: Je la inaŭguro de la omaĝa memortabulo, kion oni spektis? Simple eksterordinaran neglekton, verŝajne nepardoneblan.

Ĉu iu kulpas pro tio? Do, mi ne respondos tian demandon. Post ĉiu kongreso, ĉiuj faras al si propran bilancon pri la arango. Tio estas, ĉu ĉio marŝis glate, ĉu alloge, ĉu sukcesplene, ĉu Esperant-etose kaj ceteraj ĉu-demandoj. Mi iras ja ion pli profunden. ĈU KONGRESO? Ĉar se plimulto el la kongresantoj montras pli grandan intereson pri plaĝo, naĝejo aŭ biciklo, ol pri sia plej grava jarkunsido, tio signifas ke la allogaĵo ne plenumis sian celon. Mi diras tion ĉefe pensante pri la kubanoj, kiuj eble malprofitis unikan ŝancon partopreni IJK. Certe nin malhelpis la fakto ke la kongresa loko troviĝis iom apartiĝinta kaj ke tie turismadis ankaŭ kelkaj neesperantistaj homoj.

Kompreneble ĉe Playa Girón malglataĵoj ne regis la tutan tempon. Oni efektivigis la programitajn prelegojn — malgraŭ magera partopreno de junuloj. Pri la artaj vesperoj oni ne povas multon diri.

La Nacian savis ensemblo *Merique* per enue longega prezento kaj la Internacia rezultis same teda. Sukcesis la arango pentri sur granda tabulo, kaj pluraj homoj ŝatis la ekskursojn. Sed jen oni povas aldoni novan demandon... kiun rolon ludas TEJO? — kaj oni ne miskomprenu la demandon —, ĉar intencante kontakti ilin por la preparlaboroj, ni adresis pli ol unu leteron kaj neniam ricevis respondon. Tio montras al ni, ke ĉe la organizaĵo ekzistas vakuo. Fojfoje kiam ni prikomentis TEJO, pro tio mem ke ili ne respondis niajn leterojn, elstarigis konfuziga dubo: ĉu TEJO estas nefunkcipova fantomo kiu atestas pri iu junulara agado? Do se tiurilate oni demandas la havanan LKK kaj



junulara agado? Do se tiurilate oni demandas la havanan LKK kaj multajn aliajn homojn, jesa respondo tuj elŝprucos el ili.

Persone mi konsideras, ke ene de TEJO ne ĉio funkcias bonorde. Oni nepre atentu la fakton, ke preskaŭ de antaŭ du jaroj ĝia komitato decidis nenion pro manko de kvorumo. Alflanke ni scias, ke dum eŭropaj kongresoj multaj homoj —nome de TEJO— helpas kaj la organizadon kaj la efektivigon... sed ĉu Eŭropo estas la mondo? Ĉar lerneje mi lernis ke tiu kontinento konsistigas mondan kvinonon. Cetere, mi certas ke ankoraŭ tiu geografia situacio daŭras. Malgraŭ ĉio ĉi la homoj taksis la kongreson sukcesa kaj aliaj konsideris ĝin ferisemajno. El tiu rezulto oni povas iri konkludon, faru vi la proprajn, sed mi ŝatus elstarigi la fakton, ke TEJO devas fine kompreni, ke ekster Eŭropo ekzistas kvar aliaj mondoj. La monda junulara organizaĵo devas do multe pli serioze antaŭvidi kiel helpi, agi kaj kunlabori kun ekstereŭropaj preparokomitatoj. Ni elmontris al la mondo, ke oni povas kalkuli je la kuba junularo. Laste, se la 46an IJK ne kronis la antaŭvidita sukceso, malgraŭ pli ol kvar monatoj da preparoj sen ajna sperto niaflanke, nek helpo fare de TEJO, almenaŭ kuragon ni montris.

AVANCKONKURSO

Kiel ĉiuj el vi povas konstati, la nuna numero atingas viajn manojn iam post la jarkomeno, kaj pro tio, kion ni promesis al vi paŝintare jam ne plu validas rilate la konkurson.

Ankaŭ bedaŭre konfesendas, ke la serĉstrebaj en numero 2 estis tute senrezultaj. Kion fari? Eĉ mi timas, ke se ĉiuj mi petas reŝon pri la afero ĉu daŭre devas aperi AvancKonkurso, vi ankaŭ same malĝentile silentos.

Sed ja tio estas Esperantista revuo, kaj pro tio... ni semas kaj semas konstante!

Post tiu aŭtentike verda sprono, niĝ gekaraj estas invitataj respondi la jenan demandon. Se via respondo atingas la redakcion antaŭ la spero de la venonta numero (rapidu ĉar eble venontsemajne ĝi iros al la presejo), vi havos libropremion. Se vi sendas respondon por la tri aperigitaj demandoj vi ricevos krom la premio, atestilon pri via fideleco al Avanco. Kaj se vi sukcesas ankaŭ enmeti la respondon por la kvara demando, do... mi okkredos je la ekzisto de mediumoj.

Demando n-ro 3/1990

Belartaj Konkursoj de UEA estas gravega kultura institucio de Esperantio, al kiuj ni ŝuldas grandan parton de la trezoroj de la Esperanto-literaturo dum jardekoj. Dum la lastaj premialjuĝoj en BK, du verkistoj, viro kaj virino estis la nekontesteblaj ĉampionoj, kiuj akumulie por si leonon parton de ĉiastpeciala premioj. Ĉu vi povas indiki pri kiuj temas?

Trafollumado de revuo *Esperanto* estas treege helpal!

Sendu la respondon al:
AvancKonkurso
pf. 2018, 10200 Havano
Kubo.



Fremdlingva
Eldonejo José Martí

scelgas la aperon de nova libro

La forto de l'silento

*Kolekto de kvin noveloj
el samnombro da aŭtoroj
pri kontraŭspiona agado
dum la unuaj jaroj
de la kuba revolucio.*

El la hispana tradukis Maritza Gutiérrez González
Havano: Fremdlingva Eldonejo José Martí, 1990
119 paĝoj. 21 cm. Prezo: 3.75 USD

Distribuas:
UFO Esperanto
Poŝtfako 6197, 10600 Havano
Kubo

Sendu viajn mendojn al la distribuanto
kaj vian pagilon al UEA
kun klara indiko: por la konto *ufos-s*
Interesitoj en nepagipovaj landoj
kontaktu ankaŭ la distribuanton
por pritrakti specialajn liverkondiĉojn.

En la venonta numero, i.a.:
Fonetikaj problemoj de la kubaj Esperanto-parolantoj
Raporto pri la Komitatkunsido de KEA

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro